Theodor Storm,

# Ne pligrandiĝas la homoj

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

*“Sub la signo de la morto“ staris la poezio de Stormo pro sia suferado je la fineco de la vivo ekde la komenco. Sed elkreskis ĉe li el la sento de la pasemeco forta kredo pri sencoplena ekzistado. Li kredis, ke la homo povas vivi sen espero pri pluvivo en la transejo, planante kaj formante sian sorton mem. Tiu tensiorilato plue restis por Stormo instiga. Kaj tiel troviĝas kiel origina finaĵo de la poezia ciklo „Profundaj ombroj“, kiu aperis senpere post la morto de sia edzino Konstanco, ankau jena poemo, kiu formas kvazaŭ la alian poluson de tiu tensia rilato:*

„Ne fariĝas pli grandaj la homoj,
Sed inter la homoj
Kreskas pli kaj pli
la mondo de l' penso.
Pliseveron postulas ĉiu tago
De la vivantoj.
Kaj vidas ĉiuj,
Kiuj scipovas vidi,
ke el la beata kredo de l' kruco
Elrompiĝas alia,
Pli senegoisma kaj pli granda.
Ties ordono estos:
Vivu noble kaj bele,
Sen espero pri estonta estado,
Sen kompenso pri faroj,
Nur pro la belo de l' vivo.“

. . .

Theodor Storm,

# Größer werden die Menschen nicht

*”Im Zeichen des Todes“ stand Storms Dichtung durch sein Leiden an der Endlichkeit des Lebens von Anbe-ginn. Immer war aus dem Gefühl der Vergänglichkeit aber auch ein starker Glaube an ein sinnerfülltes Dasein erwachsen, in dem der Mensch, sein Lebensgeschick selbst planend und bildend, ohne Jenseitshoffnung aus-kommen könnte. Dieses Spannungsverhältnis blieb für Storm weiterhin konstitutiv. Und so findet sich als ur-sprünglicher Abschluss des Zyklus „Tiefe Schatten“, der unmittelbar nach dem Tode (seiner Ehefrau) Cons-tanze entstand, auch folgendes Gedicht, das gleichsam den anderen Pol dieses Spannungsverhältnisses bildet:*

„Größer werden die Menschen nicht;
Doch unter den Menschen
Größer und größer wächst
Die Welt des Gedankens.
Strengeres fordert jeglicher Tag
Von den Lebenden.
Und so sehen es alle,
Die zu sehen verstehn,
Aus dem seligen Glauben des Kreuzes
Bricht ein andrer hervor,
Selbstloser und größer.
Dessen Gebot wird sein:
Edel lebe und schön,
Ohne Hoffnung künftigen Seins
Und ohne Vergeltung,
Nur um der Schönheit des Lebens willen.“

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Größer werden die Menschen nicht" de* THEODOR STORM *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 2002-04-14.*

*MR-386-1 / Arg-199-395 (2004-03-06 06:13:15)*

*La germana-lingva originalo de tiu ĉi poemo estas presita en la libro „Thedor Storm" de Regina Fasold, el la serio Bild-Biographie, eldonita de la eldonejo VEB Bibliographisches Institut Leipzig, en 1990, ISBN 3-323-00196-6. El tiu libro estas prenita ankaŭ la supra klariga teksto.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* THEODOR STORM *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04).*

*Arg-199-394 (2004-03-06 06:12:54)*

*Das Gedicht ist abgedruckt in dem Buch „Theodor Storm" von Re-gina Fasold, aus der Reihe „Bild-Biographie" , herausgegeben vom Verlag VEB Bibliographisches Institut Leipzig, in 1990, ISBN 3-323-00196-6. Aus diesem Buch ist auch der obige erklärende Text entnommen.*